ISSN 0299-092X

# monda solidareco

N-ro **107 - Aùgusto 2012** - kvaronjara - **1.25 €**

## Renkontoj sur Afrika tero aŭ ...

# Bonan alvenon !



De 2008 kelkaj administrantoj iniciatis viziti ĉiun jaron okcidentan Afrikon (Benino, Burkinio, Senegalio, Togolando). La deziro ekkoni tiujn landojn ne estas la ĉefa motivigo, eĉ se ĝi estas parto de tio, kio instigas ilin iri al Afrikaj civitanoj.

Ekiri signifas lasi sian hejmon, siajn referencojn, siajn antaŭjuĝojn. Ekiri implicas iri al. Iri al la aliaj, al ties renkonto. Vojaĝante oni konsentas travivi la realaĵon kaj ne kontroli la ideon, kiun oni havas pri ĝi.

Kompreneble en MSM interŝanĝoj antaŭis la realan renkonton, la administrantoj zorge esploris la dosierojn, ili kunportas la filozofion de MSM, ili ne tute serĉas aventuron. Ilia vojaĝo havas trioblan celon : renkonti la aliĝintojn de MSM, taksi la evoluadon de la projektoj kaj kompreni iliajn vivkondiĉojn, aŭskulti iliajn dezirojn, ekkoni iliajn kulturojn, fine ekkoni ilin persone kun iliaj apartecoj, iliaj propraj kulturoj. Tiamaniere la renkontoj baziĝas sur reciprokeco.

Tiu interrilatiĝo estas malfacila por ĉiuj, ĉar Francio neniam sciis aŭ konsentis, male de Britio, lasi veran sendependecon al la ekskoloniaj Afrikaj ŝtatoj. La ambaŭflanka interpersona rigardo estas ofte ankoraŭ perturbita pro tio. Malfacila sed tute ne neekzistanta interrilatiĝo ! Ĉar ĝi rezultas el miksitaj inteligenteco, konfido kaj emocio, la rilato aperas tuj kiam estas sincereco - rigardo, interparolado, aŭskultemo veraj.

La rigardo, se ĉiuj sensoj vekiĝas, estigas intuician komprenemon, ebligas subkompreni la neesprimitaĵojn, instali la komunikadon. La parolo eksplicitigas tion, kion iu opinias evidenta kaj kio ne estas tia laŭ la alia ; la parolo plene iras trans tio, kion oni eventuale povus skribi. Aŭskultemo ebligas forgesi kion foje oni dezirus aŭdi.

La klopodo iri surloken alportas klarigon pri la vivkondiĉoj de la vilaĝanoj, ties zorgoj, ilia komunuma funkciado ... Ĝi alportas al la vilaĝanoj sencon, eksplikadon pri la postuloj de la administrantoj. Tiu vido preciziĝas laŭ la tempo, la renkontoj, laŭ la interŝanĝoj ... Ligiloj teksiĝas, pli kaj pli densaj laŭ la pasanta tempo.

Tie la surloka konstato de la prinutraj malfacilaĵoj de la grupoj (malbonaj rikoltoj, daŭro de la mankperiodo ...) alportas al la administrantoj partan respondon pri la malfruiĝantaj repagoj de la projekto-

## Enhavo

Renkontoj sur Afrika tero ... p. 1
Efiko de financado ... p. 2
La vojoj de la solidareco ... p. 3
Vojaĝo en Senegalio ... p. 4
Restado en Benino ... p. 7
Renkontoj en Benino ... p. 9
En Burkinio ... p. 11
Ekta Parishad ... p. 14
Ehoj el la Administra Konsilantaro ... p. 15
Ĉe la financoj ... p. 16

pruntoj, eĉ ankaŭ de la pagado de la kotizoj. La alporto de la klarigaj respondoj al la demandoj ebligas revizii la strategiojn, adapti ilin al la momenta situacio, enkalkulante la neantaŭvideblaĵojn.

La koncepto pri « tempo » estas taksata diverse laŭ tio, ĉu oni situas en Eŭropo, ĉu en Afriko. Partopreni en la ĉiutaga vivo de viroj kaj inoj de la grupoj, de responsantoj de la Pluzorgaj kaj Kunordigaj Burooj, estigas sin konfronti al la problemoj de komunikado (manko de telefona reto, manko de interreto), de veturado de iu loko al alia (longaj vojaĝoj per buso aŭ per aŭto kun la ligitaj riskoj) ...

Post tia sperto, la tempoj por respondi al la petoj de la lokaj responsantoj (klopodoj ĉe la administracioj, leteroj, elektronikaj kaj telefonaj mesaĝoj) estas taksataj kun empatia komprenemo.

Tie teksiĝas reto da produktistaj asocioj kun ties solidarecaj kasoj, ie la serĉo de energio respektanta la mediajn fontojn, aliloke ankoraŭ la problemo integri la ĝustan dozon da moderna teknologio, nepra, en la prapatran kulturon ... ĉie oni malkovras iniciatojn, demandojn, kiuj evoluigas la filozofion de MSM.

Ie kaj tie, en malsamaj kondiĉoj de vivo kaj de kulturo, ĉie, oni renkontas admirindajn homojn, sindonemajn, dignajn, « belaj personoj ». Oni ekkonas tiujn, kiuj surloke, ĉiutage, impulsas novajn agadojn, helpas por konkretigi projektojn kaj tiamaniere alportas esperon kaj konkretajn sukcesojn al aliaj kaj ĉio laŭ la spirito de MSM. Nur surloke oni konsideras la amplekson de la laboroj faritaj de la PKB. Tiuj renkontoj kaj tiuj konstatoj plifortigas la motivigon de la Administra Konsilantaro en ties agado de monda solidareco.


Ekiri, signifas iri al alia. Reiri estas reveni tiom pli riĉa en si mem je parto de ĉiuj.

Tiuj homaj aventuroj nepre necesas ĉar ili malkovrigas la riĉecon de tiuj homoj unue je spirito de solidareco, kiu ne estas vana vorto, je kreiveco, je decidemo « ***nenio problemas*** », je espero kiu animas ilin « ***ĉio bonas*** » je grava kapbleco adaptiĝi laŭ la situacioj, revigliĝi, fariĝi la decidantoj de sia vivo. La vojo de MSM ankoraŭ longas, sed ĝi estas definitive signita.

Temis pri rigardo, interparolado, aŭskultemo sed oni ne forgesu la rideton, kiun oni devas pro kora ĝentileco, pro singardemo laŭ kelkaj, ĉiam gardi, eĉ ekdormante ...

*La « Safariaj panjoj »*

« safari = vojaĝo » en svahila lingvo.



### Kio estas la efiko de financado de projekto ?

Ĉiu projekto estas portata de deko da homoj ariĝintaj en vilaĝa grupo. Ĉiu el tiuj homoj certigas la nutradon de unu familio, proksima aŭ parenca, denove de almenaŭ deko da homoj. Tio ne estas nenio !

La nutradon, sed ankaŭ la lernejajn kaj la kuracajn kostojn.


Ne forgesante ke farscio, dinamismo disvastiĝas al la tuta vilaĝo, eĉ al la ĉirkaŭaj vilaĝoj ...

Kompreneble, la financado de projekto ne solvas ĉion, sed per malmulto oni tamen povas fari multon.

*Laŭ la atesto de Bakary Ouattara, en novembre 2011, antaŭ la municipo de Nouaillé Maupertuis, malgranda urbo fidela al MSM.*







# La vojoj de la solidareco



## ... pasas tra Benino



La grupo La Kvin Fingroj, post grandegaj malfacilaĵoj, rekomencis repagi la prunton donitan de MSM en 2003.

La grupo estis financita en 2002 kaj 2003, poste ĉar ilia kamparo estis parceligita, la grupo sin dividis : el la 32 membroj, 23 eliris. Nun 12 homoj konsistigas la grupon. Ili luprenis unu-hektaran parcelon, kie ili kultivas ananason. Sed la parcelo estas malproksima ! kaj la kultivo de ananasoj ne facila ; ili preferus kultivi maniokon.

*S-ino Anato, prezidantino de la grupo La Kvin Fingroj.*

## Ili pasas tra Senegalio

La ina grupo Teddungal Sippobe honoris sian promeson respektante la repagdataron. (vd.p.6)

## Ili pasas tra Burkinio



Kie MSM enkontigas la repagon de la prunto de la grupoj Espero kaj Koboro ..

Kie S-ino Agathe Sanou el la grupo Gnoumalon solidarece daŭre kotizas, dum la grupo respektis sian kontrakton kun MSM.



Kie Bertrand Kissou konsentis fariĝi korespondanto de MSM en Vagaduguo, kune kun Symphorien Meda, korespondanto jam de 2003, kies profesio ne ebligas moviĝon. Bretrand Kissou estas turista gvidisto kaj stiristo ; li membrigis kvin grupojn.

## Ili pasas ankaŭ tra Kamerunio

La Mondcivitana Registrocentro en Kamerunio, situanta en Nkongsamba, deziras partopreni en la aktivecoj de MSM. Tiu asocio prezidata de Alain Noël Njiokem Nkwatchou fariĝos korespondanto de MSM.

# Vojaĝo en Senegalio

*Claudine kaj Pierre Tournier, Danièle Charier*

***De la 5a ĝis la 17a de novembro 2011** : unua vizito de administrantoj de MSM al la Senegalaj Globidaranoj (depost la vizito de Jacques kaj Alice Dumeste en 1992 vd.M.S. n°37).*

Ni estas akceptitaj en Dakaro de Thiayedia Ndiaye, responsanto de la asocio, kiun li iniciatis : ***Asocio por Disvolviĝo Integrita kaj Daŭra*** – « ADID », partnero de MSM. Oni invitis nin festi « tabaski » (ŝafofera festo) en lia hejmo, kie ni renkontas Arona Sow, ankaŭ membro de ADID, kaj kiun ni revidos en Dahra.





Arona Sow



Thiayédia Ndiaye

Okazis varmkora momento de renkonto kaj ankaŭ de informado pri la grupoj de MSM en Senegalio, de fruktodonaj interŝanĝoj pri la filozofio, la estonteco kaj la agadrimedoj de MSM.

La grupoj aliĝintaj al MSM situas en la « Barbaria Lango » apud Louga por la grupo PATDEN kaj en la regiono de Ferlo en Dahra kaj norde de tiu urbo por la aliaj.

## PATDEN



Souleymane Bâ

Renkonto kun Souleymane Bâ (prezidanto) kaj Djiby Sow (sekretario), la aliaj membroj forestis pro la festo.

La grupo konsistas el 10 aktivaj membroj disaj tra tri vilaĝoj ; ĉiu havas sian parcelon kaj kultivas legomojn (ĉefe cepojn). La grupo ne havas komunan parcelon.

Ili raportas pri siaj nunaj aktivecoj pri siaj analizoj kaj pripensoj : ilia tuta aktiveco estas portata de etiko, respekto kaj protektado de la medio, interŝanĝo pri sukcesoj kaj malsukcesoj.



Djiby Sow




**Ĉerpado de akvo**

Inter siaj projektoj, ili pripensas pogutan irigacisistemon funkciotan per renovigebla energio (suna kaj aŭ venta).



En Dahra, ni estas akceptitaj de Cheik Malik Sow, kaj de la responsantoj de ADID.



Cheik Malik Sow, prezidanto de 'ADID

ADID – Asocio por Disvolviĝo Integrita kaj Daŭra



Federigas 14 vilaĝajn sekciojn. Kvar homoj (du inoj kaj du viroj) de ĉiu sekcio partoprenas en la Ĝenerala Asembleo.

Ĝi kreis :

Ä laktejon

Ä stokejon por la bruta provianto en mankperiodo

Ä bestkuracistajn apotekojn

Ä komunuman radion, kiu estas aŭdebla ĝis 50 km.

La asocio aktivas pri alfabetigo kaj informas por la homa sano. Fine ADID instigis la homojn grupiĝi kaj aliĝi al MSM.

**Laktejo**

Temas pri malgranda laborejo por la transformado de lakto en kazeon. La kolektveturilo apartenas al ADID kaj estas stirata de dungito de ADID. Ĉiutage ĝi iras ĝis Yang-Yang por ŝarĝi la lakton kolektitan en la regiono.







## Grupo de Bestkuracistaj Helpantoj



Ok membroj de la grupo el kiuj la prezidanto Salif Sow veturis 54 km eĉ 85 km por renkonti nin en la sidejo de ADID. La grupo fondiĝis ĉirkaŭ la problemoj de besta sano.

Al la bestkuracistaj helpantoj mankas rimedoj por iri de vilaĝo al vilaĝo (publikaj busoj nur al Dahra) por vakcini aŭ flegi la bestojn ; mankas ankaŭ gasaj fridujoj por konservi la bestkuracilojn. Tiuj mankoj pravigas ilian projekton.

## Pula grupo Bisnabe en Movelle.



La prezidanto Birom Sow kaj tri el ties filoj venis en la sidejon de ADID. Poste ankaŭ kunvenis la grupaninoj. Ili estas bredistoj kaj pripensas proponi projekton de bova grasigado.



En ***Amali***, post pluraj dekoj da kilometroj sur tervojo, ni vidas la ***boraĵajn cisternon kaj trogojn***, el kiuj venas trinki multaj brutaroj de la regiono. La paŝtistoj manĝas kaj ripozas ĉe ombro.



Renkonto de la bestkuracista helpanto Abdoulaye Sow, kiu reŝargas multajn poŝtelefonojn per sunpanelo.

## Grupo Goomu Bamtaare Melvelle



Oni akceptis nin en la hejmon de la prezidanto, S-ro Harouna Bâ. La tuta grupo ĉeestas : kvin viroj kaj kvin inoj. Ili kotizis dufoje en 2007, poste en 2008 kaj 2009 kaj depost, atendas financadon... Ili volas partopreni en la organizaĵo pro solidareco. Ili rekomencos kotizi kaj prezentos bestgrasigan projekton.

## Grupo Teddungal Sippobé

En Dahra ni renkontas kelkajn inojn de la grupo inter kiuj la sekretariino, ĉe la prezidantino S-ino Seynadou Mbaye Kâ. Ili faris diversajn aktivecojn : tinkturado, etkomercado, ...

***La prezidantino repagas la lastan trionon de la prunto, t.e. 415.000 F CFA. Brave !***



# Restado en Togolando

de la 17a ĝis la 22a de novembro 2011

Claudine Tournier kaj Danièle Charier

## Lomeo

Akompanitaj de John Agebli kaj François Têté, prezidanto kaj sekretario de Globidar-Togolando, ni venas al la renkonto de tri grupoj en Malalta-Mono.

***DJIFA, NOVILONLON, AMENOUVEVE*** estas enkadritaj de la NŜO OVAD-AP, kiu pere de APGA/3A rilatigis kun MSM. La tri grupoj kotizas depost 2009, estas miksitaj kun ina plimulto kaj prezidataj de inoj. Ĉiuj membroj de la tri grupoj multe laboras sed la denseco de la loĝantaro estas tia, ke nutraĵo ofte mankas al ili. Por moderigi la kamparan elmigradon kaŭzitan de la malriĉeco la NŜO instaliĝis en la regionon por helpi la grupojn organiziĝi. Tio estas la kazo de OVAD-AP, kies membroj gvidas kaj akompanas nin por renkonti la grupojn.

## DJIFA



en la vilaĝo Toulassi :

La grupo kultivas maizon kaj maniokon sur unu hektaro kaj duono. Ĝi deziras financan helpon por pligrandigi la kulturatan surfacon kaj rekomenci la kultivon de tomatoj, se ĝi trovos vendolokon, kiu certigos taŭgajn enspezojn.

## NOVILONLON,



en la vilaĝo Kewome : La grupo produktas maizon, kaj maniokon, kiun ĝi transformas en farunon. Maizo kaj manioka faruno estas stokataj ĉe membro de la grupo, ĉar ĉi lasta ne havas propran stokejon. Ili ankaŭ bezonus pri maniokoraspilo.

## AMENOUVEVE



aŭ « Graco », en la vilaĝo Deveme :

La inoj estas dungitaj kiel agrolaboristinoj ĉe bienposedantoj, kaj havas kolektivan kampon. Ili kultivas maniokon, kiun ili transformas en farunon kaj en tapiokon. La vilaĝo estas enklavo ; neniu ebleco por disvendi, jen problemo.



OVAD-AP, John Agbeli kaj François Têté

### *Kunveno aranĝita de Globidar-Togolando*

La PKB kunvenigis la Globidarajn grupojn de la Mara kaj Altebenaĵa regionoj, kaj ankaŭ kelkajn grupojn kaj NŜO, kiuj interesiĝas pri MSM.

John Agbeli prezentas Globidar-Togolandon. La reprezentantoj de la grupoj FLIFE, LATSE, ESTONTECO kaj FIDES priskribas siajn kurantajn aktivecojn kaj informas pri siaj sukcesoj kaj malfacilaĵoj. La forestantaj grupoj MOKPOKPO kaj MAWUENA mesaĝis por senkulpiĝi.

Sep grupoj aŭ NŜO sin prezentas kaj demandas pri la funkcimaniero de MSM kaj pri la aliĝaj kondiĉoj.



### *Subskribo de la solidareca kontrakto inter la grupo LATSE kaj MSM.*

Malalta prunto donita de Globidar-Togolando ebligis la grupon **LATSE** ricevi klerigadon pri la bredado de kuniklidoj kaj komenci la activecon en novembro 2010. Ni vizitas la provizoran kuniklobredejon, kie svarmas kaj bonfartas la kuniklidoj. Fakte la dekomenca projekto de bredado de porkidoj transformiĝis en bredadon de kuniklidoj.

Tuj post la ricevo de la financado, la bredejo estos konstruita en Dalavé, loĝloko de la grupo kaj la kuniklobredado plu evoluos tie.

## *SOKODEO*

Ĉiuj renkontoj okazas en la Amikeca Ĉambro en la ĉeesto de Komlavi Bitoka, prezidanto de Loka Asocio de MSM (LA-MSM) en Sokodeo.


S-ro Tabe, prezidanto de la grupo **DIYIMORH**, informas, ke tiu grupo rekomencis kotizi en 2010 kaj prezentos evoluprojekton. La grupo estus profitonta de loka malgranda kredito.

S-ro Massimayele, sekretario de la grupo **BIDJOUGOU**, dankas MSM pro la financado de la projekto de kultivado kaj de bredado. Li sendos agadan raporton.

S-ino Lantam kaj S-ino Napo-Bagna, respektive sekretariino kaj prezidantino de la grupo **DIWOUDARE** raportas pri la agadoj ( la ŝafidoj kaj kokidoj mortis ; duhektara parcelo aldoniĝis por la kultivado ; oni plantis mangajn, gujavajn, akaĵuajn arbidojn ; malfermo de butiko en Sokodeo apud la hejmo de la prezidantino).

S-ro Kedessim prezidanto de la grupo **VERDAJ FINGROJ** bilancas la situacion : la ŝafidoj mortis, la ŝafisto forpasis. La ceteraj membroj kultivas maniokon kaj antaŭvidas aĉeti kaprinojn, sed ili trovu paŝtiston. Ili provos rekomenci la repagojn en 2012.

S-ino Djenabou Adam, kasistino de LA-MSM en Sokodeo prezentas la financan raporton. Ŝi donas al ni la monsumon de la kotizoj kaj repagoj.



*La prezidanto*



*La sekretario*



*La kasistino*



*kaj la federacia sekretariino*

# Renkontoj en BENINO

De la 23a ĝis la 27a de novembro 2011

Claudine Tournier kaj Danièle Charier

Akompanataj de Komlavi Bitoka, ni alvenas en Djougou, kie ni retrovas Jean Anato kaj Abdoulaye Djafarou, prezidanto de la **Reto de la Legomkultivistoj de la Regionoj Atakora kaj Donga** (REMAD), kiu ricevis informojn pri la filozofio de MSM fare de Constant Gbeze, sekretario de la PKB-Benino.

**REMAD** konsistas el grupoj da legomkultivistoj, inter kiuj kelkaj specialiĝis en la kultivado de la terpomoj sub la instigo de S-ro Djafarou. La tuta reto funkcias laŭ solidareca principo : ĉiu grupo posedas solidarecan kason provizitan per kotizoj kaj ankaŭ la reto posedas federacian kason. Tio ebligas seninterezaj pruntodonoj por subteni la grupojn, kiuj travivas malfacilaĵojn, aŭ por subteni la evoluigon de iliaj aktivecoj.

Ili funkcias laŭ maniero proksima al MSM kaj deziras aliĝi pro solidareco por ĉefe aliri al landa kaj internacia reto por profesiaj kaj ideaj interŝanĝoj.

*En Nattitingou, post kelkminuta interveno dum kunveno de REMAD por prezenti MSM, ni ekiras al Ouassa-Pehunco kaj ekkonas Souleymane Kora-Zaki kaj Amidou Guerra, sekretario kaj administranto de la* ***Asocio de Terpomkultivistoj de Pehunco****, kies prezidanto estas Abdoulaye Djafarou.*



Abdoulaye Djafarou maldekstre

kaj

Souleymane Kora-Zaki dekstre





*Souleymane Kora-Zaki akompanas nin por viziti tri inajn grupojn je kelkaj dekoj da km sur malfacilaj tervojoj :* ***Tonri, Tobré kaj Bokossi*** *(legomkultivado)*

Ni estas akceptitaj de S-ro Barthelemy Sabi Yoro, urbestro de Pehunco, tre sentema pri la spirito de MSM kaj pri monda civitaneco.



## Kunveno de la grupoj

En Come laŭ la iniciato de la PKB kunvenas la reprezentantoj de la grupoj : ***Sodjivemawu, la Kvin-Fringroj, Mahougnon, La Dia Mano, La Paco, Gbedjemissi, JAC kaj MuJeSaf***.



Ĉiuj parolas pri siaj aktivecoj, pri la kotizoj kaj la venontaj repagoj.

Vizito de la instalaĵo de la **Junaj Agrikulturistoj de Comé** (JAC) freŝdate financita de MSM (la grenmuelilo funkcias) kaj la dekoraciita superigita cisterno ornamita ...





***ho, surprize !***







***per la emblemo de MSM !***






***... kaj tio funkcias !***



# En BURKINIO

de la 23a de januaro ĝis la 5a de februaro 2012

Danièle Charier

Symphorien Méda, korespondanto de MSM en Vagaduguo akceptas nin : Claude kaj Sylvie Lambert, Michel Vendé, Norbert Chapelon, Bernard Moreau kaj mi Danièle Charier. Ni renkontos unue la Globidaranojn de la regiono de Bobodiulaso kaj poste tiujn en Vagaduguo.



Bakary Ouattara kondukas nin por ĉiuj vizitoj en la Bobodiulasa regiono.

En **Samogohiri**, la unua financoparto de la projekto de la grupo **Modjibe-Dji** estis parte retenita de la tiama responsanto de ADRI/AKAP. Konsekvence la konstruaĵo ne estas tegmentita kaj ne havas plankon. Fabé Traoré diras, ke ĝi estas tro vasta. Malŝpare.

Per la dua financoparto de la projekto, la membroj de Modjibe-Dji aĉetis maizon, kiun ili deponis en konstruaĵon, kies muroj disfalis pro la pluvegoj. La maizo estas nun tenata en konstruaĵo, kiu apartenas al la prezidanto.

La ina grupo **Benkadi** daŭrigas siajn aktivecojn : sabdarifo*, arakidoj, fazeoloj. Ili projektas aĉeti grenmuelilon.

En **Padema**, ni ekkonas la membrojn de la grupoj **Yancadi**, **Toyow** kaj **Yerelon**.

La du unuaj neniam ricevis la financadon de siaj projektoj, kvankam ili estis pagitaj de MSM kaj profitis de malgrandaj pruntoj de 600 eŭroj. Tiu monsumo ebligis ilin plibonigi siajn agadojn (atingita celo) sed ne sufiĉis por ke tiu plibonigo daŭru. Yerelon estas nova grupo.







En **Baré** malkonsento kontraŭstarigas la prezidanton Noumoutier Sanou kaj la membrojn de la grupoj **Pefourou-3** kaj **Pefourour-4**, malkonsento, kiun ni provas moderigi, petante la prezidanton ĉesigi la financajn neregulaĵojn kaj ripari tiujn faritajn.



* **sabdarifo** : « Hibiscus Sabdariffa » (loka nomo : bissap) : esperantigita nomo de la planto kaj de la trinkaĵo farita el ĝi *(John C.Wells)*

En ***Dodougou***, akcepto kun balafonoj kaj dancoj atendas nin. Multaj membroj de la grupoj ***Korobo*** kaj ***Sinsignanssigui*** estas vizitantaj siajn familiojn.





Kunveno de ĉiuj regionaj Globidaraj grupoj okazas en Bobodiulaso laŭ iniciato de la PKB. Unu el la celoj estas ekspliki la manieron por enmeti la kotizojn kaj la repagojn en la bankan konton de Globidar-Burkinio freŝdate malfermita.

Tio estis ankaŭ okazo por respondi multajn demandojn koncerne la funkcimanieron de MSM kaj ekkoni la du delegitojn el **Eburio** : Abdoulaye Ouattara kaj Brahima Ouattara, kiuj reprezentas la grupojn ***Sinsignanssigui*** kaj ***Djiguya*** en ***Torla***. Ili deziras ricevi pliajn ĝeneralajn informojn kaj fondi Pluzorgan kaj Kunordigan Buroon.



***Badedeme*** en ***Panamasso*** estas dekmembra grupo, kiun prezidas S-ro Sanou Prosper. Tiu asocio estis fondita en 2000 por provi atingi memsufiĉon, provizante solidarecan kason. Tiu senhava grupo kultivas milion, maizon, sorgon, sezamon, arakidon kaj maniokon. Ili pretigas projekton : bovparo kaj la tir-akcesoraĵoj.

En Bobodiulaso ni renkontas Mastron Kouesse Sanon, advokato en la afero, kiu starigas MSM kontraŭ Dramane Traoré. Poste ni konsultas responsanton de mutuala ŝparkaso al ebla partnereco.

En Vagaduguo, Symphorien Meda prizorgas nin nur dum vespero (pro labordevigo) kaj Bertrand Kissou kondukas nin dum tago al la grupoj al kiuj li prezentis MSM.



***Wakogldo*** estas sepmembra grupo, kiun prezidas Gilbert Zongo kaj en kiu Bertrand Kissou estas membro. Ili vivas en kvartalo de la Vagadugua ĉirkaŭurbo. Ili praktikas teksadon.





### Wend Panga en Wati Nooma

Ĉiuj membroj loĝas en Petit-Samba, vilaĝo de Bertrand Kissou. Ili kultivas legomojn dum la pluvsezono kaj ŝajnas senhavaj dum la seka sezono. Oni konsilas al ili ekrilati kun S-ino Agathe Sanou el la grupo Gnoumalon por informiĝi pri la tekniko de konservado kaj transformado de fruktoj kaj legomoj (sterilizado, konfitaĵoj, sekado ...) por resti aktivaj dum la mankperiodo, sed mankas elektro.

***Tend Ménégré*** en ***Petit-Samba*** estas grupo el dek inoj, kiun prezidas S-ino Angèle Ouedraogo, fondita antaŭ 10 jaroj, aliĝinta al MSM en 2010. La aktiveco konsistas en la aĉetado kaj la revendo de grenoj. Tio estos la objekto de ilia projekto : la unua financoparto utiliĝos por aĉeti grenojn stokotajn unuatempe ĉe la membroj, poste per la profitoj la grupaninoj projektas la konstruadon de magazeno.





En la vilaĝo, 13 inaj grupoj konsistigas unuiĝon, kiun prezidas Angèle Ouedraogo. Tiuj grupoj venos al MSM pli malfrue. Ekzistas ankaŭ grupoj el viroj, kiuj bredas brutojn, sed ili ne estas grupitaj en unuiĝo.

***Delwende N'Paam Panga*** en ***Kounda***



Depost la forpaso de Dieudonné Nikiema, neniu havis la adreson de tiu grupo, sed Bertrand nia stiristo en 2008 retrovis la lokon. La prezidantino, ne antaŭinformita, akceptas la delegacion. Ŝi estas kontenta religiĝi ĉar ankaŭ ŝi ne sciis al kiu sin turni. Oni interŝanĝas la kontaktinformojn. Mateo, frato de Dieudonné transprenas la taskon.

Ni faras viziton al S-ino Agathe Sanou prezidantino de la grupo ***Gnoumalon***, kiu ricevas nin en la ĉeesto de S-ino Habibou Apiou, kasistino (vd en p.3 « ***la vojoj de la solidareco*** »).

# Monda Solidareco kontraŭ la Malsato subtenas Ekta Parishad *

***aprobante la deklaracion de solidareco kun la granda hinda marŝado Jan Satyagraha***

## Pli ol miliardo da homoj suferas malsaton

En tiu 21a jarcento, pli ol unu miliardo da homoj suferas malsaton. Ĉiun kvaran sekundon unu homo mortas pro konsekvencoj de misnutrado, plej ofte infano malpli ol 5jara. 25 % de la monda homaro konsumas 85 % de la disponeblaj riĉaĵoj kaj ĉiun jaron estas uzataj riĉofontoj je 30 % superaj al tio, kion la planedo povas regeneri.

Duono de la loĝantaroj de nia mondo estas agrikulturistoj el kiuj tri kvaronoj ankoraŭ nur mane laboras. Certigi al tiuj kamparanoj la kondiĉojn necesajn por ke ili povu perlabori estas unu el la plej gravaj defioj de daŭrebla evoluigo, por ke perforto ne estu la ununura alternativo de milionoj da malriĉuloj, malsatantaj, senposedigitaj, servutodevaj kaj migrantaj al la ladkvartaloj ĉe la urbegoj.

Terspacoj, akvo, semoj, arbaroj, ercoj - komunaj havaĵoj de la tuthomaro - estas akaparitaj de investistoj kun la konsento de la ŝtatoj aŭ pro ties nepoveco. Ĉie sur la planedo ercaj aŭ arbaraj ekspluatadoj, grandaj baraĵoj, turistaj distriktoj, ege intensivaj GMO unukulturoj por eksportado aŭ produktado de bio-brulaĵoj anstantaŭas la vivtenajn kulturojn. Tiu akaparado de la terspacoj pliampleksiĝas.

Paralele, la abundega provizado de la sudlandaj merkatoj per forte subvenciataj nutrovaroj produktitaj en la riĉaj landoj per enormaj mekanikaj rimedoj estigas mallojalan konkurencon, kiu ruinigas la lokajn kamparanarojn.



**Ekta Parishad** estas neperforta movado, laŭ Gandhia inspiro, kiu luktas por la rajtoj je naturaj riĉofontoj de la plej senhavaj en Hindio, organizante, edukante kaj emancipante la plej senhavajn homojn kaj komunumojn.



## Marŝado por la justico, la rajto je nutrado, terspaco, akvo, semoj kaj arbaroj

Organizita en Hindio de oktobro 2011 ĝis oktobro 2012 de la movado *Ekta Parishad*, **la neperforta marŝado por la justico *Jan Satyagraha*** estos forta kaj simbola agado. Ĝi kunigos en ĝia lasta stadio en oktobro 2012 100 000 malriĉulojn, senbienajn tribajn kaj pariajn kamparanojn, kiuj marŝos dum tridek tagoj por advokati siajn rajtojn je vivnecesaj rimedoj kaj je vivo en digno.

Tiu marŝado estas historia oportuno por reliefigi la fundamentajn temojn pri sociala kaj ekonomia justico : divido de la riĉaĵoj, aliro al la naturaj riĉofontoj, prinutra suvereneco, ŝuldoj de la malriĉaj landoj, statuso de la plej senhavaj en niaj socioj, rolo de la virinoj, sed ankaŭ civitana demokratio, elekto de vivmaniero kaj daŭrebla evoluigo justa por ĉiuj. Ne temas pri helpo al la mizerecaj loĝantaroj, sed agnoski iliajn rajtojn je vivnecesaj riĉofontoj, ebligi ilian laboradon kaj favorigi ilian iniciatemon.

## Ni tutmondigu la solidarecon.

Ni invitas la civitanojn kaj civilsociajn organizaĵojn subteni tiun marŝadon per ĉiuj eblaj manieroj, kaj depostuli per decidema kaj paca maniero ĉe la internaciaj instancoj (UN, ONA, MOK, EU, OEKE, G20, Monda Banko, ktp), la rajton de la lokaj loĝantaroj je aliro al la naturaj riĉofontoj (terspaco, akvo, semoj, arbaroj, ktp), kio implicas la respekton de la ekzistantaj leĝaroj kaj ties plifortigon per reguligaj kaj kontrolaj mekanismoj. Paralele, en internacia juro, **la rajto je la prinutra suvereneco devas esti agnoskita kiel supera al la rajtoj pri komerco kaj investado.**

Legita en Eĥoj de ***Solidaraj Popoloj*** (julio 2012)

Surloke, Ekta Parishad plu kolektas la subtenojn sine de la civila socio por trudi al la aŭtoritatoj. Prie la Hinda ĉefministro ĵus cedis al peto de nia partnero organizante fine la unuan kunsidon de la tutlanda konsilio por la agra reformado. Notindas, ke ĉi lasta ne kunvenis depost sia fondiĝo en 2009 ! Tiu tre kuraĝiga indikaĵo substrekas, ke la rilatoj de forteco ŝanĝiĝas.

## 1 - Funkciado kaj strukturoj de MSM

*Depost la lasta bulteno, la Federacia Administra Konsilantaro kunsidis la 17an kaj 18an de decembro 2011 à Saint-Georges les Baillargeaux, la 17an kaj 18an de marto 2012 en Quinçay kaj la 25an kaj 26an de majo en Gemeaux.*

*Tiuj « Eĥoj » el la Administra Konsilantaro sintezas la tri kunsidojn.*

è Kian financadon por **dua projekto** ?

Kiam grupo, kiu jam profitis financadon por projekto kaj respektis la solidarecan kontrakton, deziras proponi duan projekton, tiu lasta estos esplorita same kiel ĉiuj aliaj (samaj kondiĉoj, samaj postuloj) kaj trovos lokon en la financtabelo kun la jena regulo : la prunta parto povos atingi 75 % kaj la subvencia parto 25 % anstataŭ la divido 50 % - 50 % plej ofte aplikita al unua projekto.

è **Ĝenerala Asembleo de Okcidentafrika MSM.**

Kvankam ili konscias pri la graveco de tia renkonto, la administrantoj decidis pri ĝia prokrasto en 2013 : la nunaj financàj rimedoj ne ebligas plenumi la kostojn.

è **Balotelekto de la Delegitoj de Okcidenta Afriko**

Ĝi estas preparata kaj okazos en 2013.

è Al "**PKB**" en **orienta Kongio**

Sekve de la vojaĝo al oriento de Kongio (Kivuto) de **Daniel kaj Odile Durand** en lasta aprilo, Pluzorga kaj Kunordiga Buroo verŝajne konsistiĝos por kunordigi la multajn Globidaranojn en la regiono.

è Novaj korespondantoj de MSM (vd en La solidarecaj vojetoj, p. 3)

Ä Bertrand Kissou en Vagaduguo (Burkinio)

Ä La Mondcivitana Kameruna Registrocentro en Nkongsamba.

## 2. - La projektoj

è Estis deklaritaj **elekteblaj** :

- 12.05.BJ La Paco – Benino. La grupo proponas projekton por prinutra sekureco.
- 12.06.BJ MuJeSaf – Benino. La grupo proponas kuniklobredan projekton.

è Estis deklaritaj **elekteblaj**, kaj poste, **financeblaj** :

- 11.02.BJ **Ayigedo en Benino**. Temas pri projekto de stokado de nutrovaroj. La financado estos ebla en septembro 2014.
- 12.01.TG. **FIDES en Togolando**. La grupo proponas projekton de kaprida kaj ŝafida bredado. La financado eblos en julio 2014
- 12.02.TG **Nonvilonlon en Togolando**. La grupo produktas maizon kaj maniokon. Ĝi deziras akiri materialon, semojn kaj grasumojn, lupreni konstruaĵon kaj aranĝi sekigejon. La financado eblos en novembro 2014.
- 12.03.TG **Djifa en Togolando**. La grupo kultivas maizon kaj deziras pligrandigi sian ekspluatejon. Ĝi deziras ankaŭ rekomenci la kultivadon de tomatoj. La financado eblos en februaro 2015.
- 14.04.TG – **Amenouveve en Togolando**. La grupo deziras pliampleksigi la jam praktikitan aktivecon : kultivado kaj transformado de manioko en farunon kaj tapiokon. La financado eblos en aprilo 2015.

## 3.- Strategio kaj komunikado

Daniel Durand prezentis MSM dum la Seminario de Tutmondismaj Studoj en Katana (Kongio), kies temo koncernis la homajn rajtojn. Daniel kaj Odile ankaŭ partoprenis en kunsidoj de asocioj interesiĝantaj pri MSM : Solidareco Bona Volo en Goma (Nord-Kivuto), kaj ADES en Kigali (Ruando)

**Christian Trianneau** kaj **Danièle Charier** prezentis mondan civitanecon kaj MSM al la municipo de Quinçay, urbeto de la departemento Vienne, kiu akceptis kunsidon de la Administra Konsilantaro en marto.

Daniel Durand instalis la « Forumon Globidar » en interreto, sekve de multaj petoj por interrilatigi de la renktontitajn globidaranojn.

è globidar@googlegroups.com

La retejo www.globidar.org estos tute rearanĝita : amiko de Claudine Tournier sin proponis por modernigi la publikan parton dum **John De La Cruz** prilaboras la administran parton.

La estontaj kunsidoj de la Federacia Administra Konsilantaro okazos la 15an kaj 16an de septembro en Braye sous Faye, la 8an kaj 9an de decembro en Niort kaj la 9an kaj 10an de marto 2013 en Nouaillé-Maupertuis.

*Globidar*
*Aŭguste de 2012*

## Dum la rilatoj inter Globidaranoj entuziasmiĝas

## Dum la idealoj de solidareco kaj de reciprokeco de MSM progresas

## Tute ne kontentigas la financoj !

Fine de la lasta kunsido de la Administra Konsilantaro, la konstato estis amara : 15 grupoj atendas financadon. Ĉiuj prezentis projektojn, kiuj respondas al kriterioj kaj al la celoj de MSM, ĉiuj reale bezonas financan ekhelpon ; kelkaj travivas ekstreman necertecon kaj ili atendu .... ĝis aprilo 2015 por la lasta !

La sumo de la financado, taksita per interkonsento inter la grupoj kaj la Administra Konsilantaro en la komenco estis limigita je 4500 eŭroj en okcidenta Afriko, poste estis reviziita je 3.000 eŭroj, pro manko de enspezoj. La administraj elspezoj malsuperas 10 % de la buĝeto (en 2011), t.e. pli ol 90 % de la enspezoj utilas por la projektoj. La Administrantoj mem pagas siajn vojaĝojn (vd. Frontartikolon) ; tamen, malgraŭ rigora mastrumado, la situacio estas almenaŭ embarasa : nekonsenteblaj atendotempoj por iuj, prokrasto de la Ĝenerala Asembleo de Okcidenta Afriko, manko de operacia kapitalo kaj de baza materialo por serena laboro de la PKB, ...

Ja, la eraroj (ĝentila esprimo) de la NŜO kiel ADRI/AKAP kaj APGA/3A multe kostis, dum la justicaj agadoj ankoraŭ ne donis konkretajn rezultojn. Krome, la globa monsumo de la kotizoj regule malaltiĝas. Kial ? Ĉu pro maltiĝo de la aĉetpovo ? Ĉu pro regreso de la solidareca sento ? Ĉu pro la malapero de la valoroj, kiuj garantias vivon ? Sendube ĉio miksiĝas. Sed kion fari ? Kion faru, nun, ĉiuj kune ?

*Danièle Charier*
*Federacia Sekretariino.*



## La Butiko

T-ĉemizoj el blanka kotono kun blua emblemeto, je mezuro M, L, XL

Globskribiloj kun emblemeto

Restas ankoraŭ ĉemizetoj kaj trikotĉemizoj kun la historia emblemeto « Fonds Mondial de Solidarité contre la Faim » (vd ĉi-sube)

*Ekster Eŭropo, vi kontaktu vian administranton.*

Povas okazi malfruiĝoj en la poŝtado (eĉ pli malbone : eraro de ordigo !) Ne hezitu sendi al ni amikan rememorigon. Ni estas volontuloj kaj ĉe ni nenio estas « aŭtomatigita » !

**monda solidareco estas bulteno eldonata de *Monda Solidareco kontraŭ la Malsato***

**JE VIA DISPONO :**

ØAliĝiloj

ØFlugfolioj pri projektoj

ØPliajn bultenojn

ØFederacia Reglamento de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato

ØAfiŝetoj (A3-formato)

*Bonvenas partopreno en la sendokosto (3 € aŭ pli)*

*Nur por Eŭropo :*

ØBlankaj ĉemizetoj : 20 € - trikotĉemizoj 15 € kun la emblemeto *« Fonds Mondial ».*

ØKovertoj DL (11 cm x 22 cm) *« Solidarité Mondiale contre la Faim »* + emblemeto : 6 € por 100 + sendokosto : 3 €

ØGlobskribilo : 1 €

ØFotoj paperaj aŭ elektronikaj.

*Se vi konstatas malfruiĝon en la liverado (aŭ forgeson !) vi bonvolu fari al ni amikan realvokon ! Antaŭdanke.*

**KOTIZOJ - DONACOJ - ABONOJ - MENDOJ :**
***Kiel pagi ?***

Äper franca ĉeko al **Globidar**

Äper poŝtaj rimedoj, je la nomo de :
**SMF- MONDA SOLIDARECO**
(PĈK-CCP PARIS 10.734.96 Z)
RIP:
**FR21 2004 1000 0110 7349 6Z02 056**

Ä per banka karto aŭ **PayPal** tra la ttt-ejo

Ä ankaŭ per monbiletoj enŝovitaj en ordinaran koverton.

ÄFEL kaj UEA kontoj : **mfsk-g**

*Librotenado je la sama adreso kiel la bulteno*

Sur la adresetikedo de la koverto aperas la proksimuma dato de via lasta financa partopreno. Vi bonvolu kontroli ĝin !

**RICEVITAJ KOTIZOJ kaj DONACOJ**

| | |
|---|---|
| Novembro 2011 | 786 € |
| Decembro 2011 | 2 166 € |
| Januaro 2012 | 571 € |
| Februaro 2012 | 1 802 € |
| Marto 2012 | 1 965 € |
| Aprilo 2012 | 820 € |

*MONDA SOLIDARECO* estas eldonita en Esperanto, kaj franca lingvo.

**Jara abono : 5 €**

**Redakcia komitato** : Alain Bal, Danièle Charier, Daniel et Odile Durand, Hotto Abdoulaye,
**Fotoj** el la fototeko de Monda Solidareco kontraŭ la Malsato **Desegnoj** : Yamsina Sahraoui
Elfrancigis Daniel Durand,
Kontrolis (ne)
Directeur de la publication : Daniel Durand
CPPAP n° 0410 G 86482.
Imprimerie de l'association.

Tel : +33 (0)241 78 47 75
info@globidar.org
**www.globidar.org**

MONDA SOLIDARECO
Les Nids
**FR 49190 St-AUBIN-DE-LUIGNE**
Francio